

16 PAŜOSPUROJ

Sinjoro Rybka tiunokte estis iranta hejmen en neordinare bona humoro, unue tial, ĉar li gajnis sian ŝakludon (kiel bela matigo per ĉevalo, li plezuris dumvoje), kaj due tial, ĉar estis falinta freŝa neĝo, kiu mole kraketis sub liaj piedoj en la bela kaj pura silento. Dio, kia belo, opiniis sinjoro Rybka; urbo sub neĝo, ĝi estas subite tute eta urbo, tia malnovmoda urbeto - oni preskaŭ kredus je noktgardistoj kaj diliĝencoj; estas strange, kiel neĝo aspektas antikve kaj province. Krak', krak', sinjoro Rybka serĉis al si neplanditan vojeton, nur pro ĝojo, ke ĝi tiel kraketas; kaj ĉar li loĝis en silenta ĝardeno strateto, malpliĝadis la paŝospuroj, dum li pluiris. Jen, ĉi tie ĉe la pordeto mankas jam viraj ŝuoj kaj virinaj ŝuetoj; versimile geedzoj - ĉu estas ili junaj? diris al si sinjoro Rybka mole, kvazaŭ li volus beni ilin. Ĉi tie transkuris kato kaj postlasis en neĝo siajn spuretojn, similitajn al floroj; bonan nokton, miaŭlino, frostos al ci en la piedetoj.

Kaj nun estas ĉi tie nur unu vico da paŝospuroj, viraj kaj profundaj, rekta kaj klara ĉeno de paŝoj, kiujn devolvis izola piediranto. Kiu najbaro iris tra ĉi tie? diris al si sinjoro Rybka kun amika intereso; ĉi tie iradas tiom malmulte da homoj, en la neĝo estas eĉ ne unu radsulko, ĉi tie ni estas sur vivorando; kiam mi venos hejmen, la strateto altiros blankan kusenon ĝis la nazo kaj sonĝos esti nura ludilo por infanoj. Domaĝe, ke matene surtretos al ni ĉion olda kolportistino; tiu faros plandspurojn zigzage, kiel leporo -

Sinjoro Rybka subite haltis: ĵus kiam li volis transiri la brilblankan straton al sia pordeto, li vidis, ke ankaŭ la paŝospuroj, kiuj tie estis antaŭ li, deflankiĝas de sur trotuaro kaj celas trans la straton al lia pordeto.

Kiu nur irus al mi? li diris al si embarase kaj okulsekvis la klarajn spurojn. Ili estis kvin; kaj precize meze de la strato ili finiĝis per akra premsigno de la maldekstra piedo; plu estis jam nenio, nur nedifektita kaj netuŝita neĝo.

16 ŜLĚPĚJE

Pan Rybka se té noci ubíral domů ve zvláště dobré míře, předně proto, že vyhrál svou partii šachu (to byl pěkný mat koněm, liboval si cestou), a za druhé proto, že napadal čerstvý sníh a měkce mu chrupal pod nohama v tom pěkném a čistém tichu. Bože, to je krása, mýnil pan Rybka; město pod sněhem, to je najednou docela malé město, takové starosvětské městečko – člověk by skoro věřil v ponocné a v dostavníky; to je zvláštní, jak sníh vypadá starodávně a venkovsky. Křup, křup, pan Rybka si hledal nepošlapanou cestičku, jen pro tu radost, že to tak křupe; a protože bydlel v tiché zahradní uličce, ubývalo těch šlěpějů, čím dál šel. Heleme, tady u těch vrátek ubyly mužské boty a ženské střípky; nejspíš manželé – jsou-li pak mladí? řekl si pan Rybka měkce, jako by jim chtěl požehnat. Tadyhle přeběhla kočka a nechala ve sněhu své ťapky, podobné kvítkům; dobrou noc, čičo, budou tě studit nožičky.

A teď už je tu pouze jeden řádek šlěpějů, mužských a hlubokých, rovný a jasný řetízek kroků, jež rozvíjel osamělý chodec. Kterýpak soused tudy šel? řekl si pan Rybka s přátelským zájmem; tady chodí tak málo lidí, ani jedna kolej není ve sněhu, jsme tu na okraji života; až dojdu domů, ulička si přitáhne bílou duchnu až k nosu a bude se jí zdát, že je jenom hračka pro děti. Škoda, že ráno nám to tu pošlape babka s novinami; ta nadělá šlápoty křížem krážem, jako zajíc –

Pan Rybka se najednou zastavil: právě když chtěl přejít přes běloučkou ulici k svým vrátkům, viděl, že i ty šlěpěje, které tu byly před ním, odbočují z chodníku a míří přes ulici k jeho vrátkům.

Kdo by to ke mně šel? řekl si zaraženě a sledoval očima ty jasné šlěpěje. Bylo jich pět; a přesně uprostřed ulice se končily ostrým otiskem levé nohy; dál už nebylo nic, jen neporušený a nedotčený sníh.

Mi frenezas, diris al si sinjoro Rybka - eble tiu homo revenis sur la trotuaron! - Sed kiel li vidatingis, estis la trotuaro glate kaj suple neĝkovrita sen ia ajn homa paŝosigno. Ej, miris sinjoro Rybka, versimile pluaj spuroj estos sur la alia trotuaro! Kaj li arke ĉirkaŭiris la nefinitan vicon da paŝoj; sed sur la alia trotuaro estis eĉ ne unu plandospuro; kaj la tuta strato plu brilis per netuŝita kaj supla neĝo, ke la spiro retenigis pro la pureco; neniuj iris tra ĉi tie ekde la tempo, kiam falis la neĝo.

Kiel strange, murmuris sinjoro Rybka, versimile la homo retrorevenis sur la trotuaron, paŝante en la proprajn spurojn; sed tiukaze li devus retroiri en siajn paŝospurojn ĝis stratangulo, ĉar antaŭ mi tra tie gvidis nur unu vico da spuroj, kaj nome en direkto ĉi tien - Sed kial tiu ulo farus tion? miregis sinjoro Rybka. Kaj kiel li povus retroirante trafi precize siajn paŝospurojn?

Kapneante, li malŝlosis la pordeton kaj eniris sian domon; kvankam li sciis, ke ĝi estas absurdaĵo, li rigardis, ĉu estas interne de la domo iaj neĝospuraĵoj; memkomprene, kiel ili tie estus! Eble nur tio ŝajnis al mi, murmuris maltrankviligite sinjoro Rybka kaj klinigis el la fenestro; sur la strato en lumo de lanterno li vidis klare kvin akrajn kaj profundajn spurojn, finiĝantajn meze de la strato; kaj nenion pli.

Tondro ĝin batu, opiniis sinjoro Rybka, frotante siajn okulojn; foje mi legis iun rakontaĉon pri unu paŝo-spuro en la neĝo; sed ĉi tie da ili estas plena vico, kaj subite nenio - kie nur perdiĝis tiu ulo? Kapskuante li komencis senvestiĝi; sed subite li ĉesis, iris al telefono kaj perdeprimita voĉo vokis polican komisarejon: "Halo, ĉu sinjoro komisaro Bartošek? Mi petas, ĉi tie estas ia stranga afero, ege stranga - Se vi sendus iun ĉi tien, aŭ prefere mem venus - Bone, mi atendos vin ĉe la angulo. Mi ne scias, pri kio temas - Ne, mi opinias, ke ekzistas nenia danĝero; temas nur pri tio, ke la spurojn neniuj surtretu - Tion mi ne scias, kies spuroj! Do bone, mi atendos vin." Sinjoro Rybka vestis sin kaj eliris denove eksteren;

To jsem blázen, řekl si pan Rybka – snad se ten člověk vrátil na chodník! – Ale pokud dohlédl, byl chodník hladce a kypře zasněžen bez jediného lidského kročeje. Inu safra, divil se pan Rybka, nejspíš ty další šlápěje budou na druhém chodníku! I obešel obloukem ten nedokončený řádek kroků; ale na druhém chodníku nebylo jediné šlápoty; a celá ulice dál svítila nedotčeným a hebkým sněhem, až se dech tajil nad tou čistotou; nikdo tudy nešel od té doby, co napadl sních.

To je divné, bručel pan Rybka, nejspíš se ten člověk vrátil pozpátku na chodník, šlapaje do vlastních šlápějí; ale to by pak musel jít pozpátku ve svých šlápějích až na roh ulice, protože přede mnou tamtudy šly jen jedny šlápoty, a sice směrem sem – Ale proč by to ten chlap dělal? užasl pan Rybka. A jak by mohl jda pozpátku trefit přesně do svých šlápějí?

Kroutě hlavou, odemkl vrátka a vešel do svého domu; ačkoliv věděl, že je to nesmysl, díval se, nejsou-li uvnitř domu nějaké sněhové nášlapky; to se rozumí, kde by se tam vzaly! Snad se mi to jen zdálo, bručel znepokojeně pan Rybka a vyklonil se z okna; na ulici ve světle lucerny viděl jasně pět ostrých a hlubokých šlápějí, končících uprostřed ulice; a dál nic.

Hrom do toho, mýnil pan Rybka, mna si oči; jednou jsem četl nějakou povídačku o jedné šlápotě ve sněhu; ale tady jich je celý řádek, a najednou nic – kam se ten chlap poděl? Vrtě hlavou začal se svlékat; ale najednou toho nechal, šel k telefonu a zavolal stísněným hlasem policejní komisařství: "Haló, pan komisař Bartošek? Prosim vás, tady je taková divná věc, moc divná – Kdybyste sem někoho poslal, nebo raději přišel sám – To je dobře, já na vás počkám na rohu. Já nevím, oč jde – Ne, já myslím, že není žádné nebezpečí; jde jen o to, aby ty stopy nikdo nepošlapal – To nevím, čí stopy! Tak dobře, já na vás počkám." Pan Rybka se oblékl a vyšel zase ven;

singarde li ĉirkaŭiris la spurojn kaj atentis ankaŭ sur la trotuaro por ne surtreti ilin. Tremante pro malvarmo kaj ekscito, li atendis ĉe stratangulo komisaron Bartošek. Estis silente kaj la terglobo loĝata de homoj trankvile lumis en la universon.

"Tie ĉi estas tiel bele silente," murmuris komisaro Bartošek melankolie. "Kaj al mi oni alkondukis iun batalaĉ-kazon kaj iun ebruilon. Fi! - Kion do vi havas ĉi tie?" "Sekvu la paŝospurojn, sinjoro komisaro," diris sinjoro Rybka tremvoĉe. "Ĝi estas nur kelkajn paŝojn de ĉi tie."

Sinjoro komisaro lumis per elektra lampeto. "Li estis longulo, preskaŭ metron okdek," li opiniis, "laŭ la plandspuro kaj paŝolongo. Ŝuojn li havis solidajn, mi opinias, ke manlaboraĵon. Ebria li ne estis kaj iris sufiĉe energie. Mi ne scias, kio ne plaĉas al vi je la spuroj." "Ĉi tio," diris lakone sinjoro Rybka kaj montris la nefinitan vicon da paŝoj meze de la strato. "Aha," diris komisaro Bartošek kaj sen longaj ceremonioj ekdirektis al la lasta spuro, kaŭriĝis kaj eklumis per la lampeto.

"Nenio grava," li diris kontentigite, "ĝi estas tute normala, firma plandspuro. La pezo bazis plivere sur la kalkano; se tiu homo farus pluan paŝon aŭ salton, la pezo transiĝus al piedpinto, ĉu vi komprenas? Kaj tio estus videbla." "Do tio signifas -," demandis sinjoro Rybka streĉe. "Nu," diris la komisaro trankvile, "tio signifas, ke li ne pluiris." "Kaj kie do li malaperis?" ekvortis sinjoro Rybka febre.

La komisaro ŝultrolevis. "Tion mi ne scias. Ĉu eble vi havas ian suspekton pri li?" "Kian suspekton?" ekmiris sinjoro Rybka. "Nur mi volus scii, kien li malaperis. Rigardu, ĉi tie li faris la lastan paŝon kaj kien, pro Kristo, li faris pluan paŝon? Ĉi tie ja estas neniuj plua spuro!" "Tion mi vidas," diris la komisaro lakone. "Kaj ĉu tio rilatas vin, kien li iris? Ĉu li estis iu el via domo? Ĉu vi rimarkas foreston de iu? Do, sakre, ĉu gravas por vi, kien li malaperis?" "Sed tion ja oni devas klarigi," ekbalbutis sinjoro Rybka.

opatrne obeŝel ty šlěpěje a dával pozor i na chodníku, aby je nepošlapal. Chvěje se chladem a rozčilením, čekal na rohu ulice na komisaře Bartoška. Bylo ticho a země obývaná lidmi pokojně svítila do vesmíru.

"Tady je tak pěkně ticho," bručel komisař Bartošek melancholicky. "A mně přivedli jednu rvačku a jednoho ožralu. Fuj! – Tak copak tu máte?" "Sledujte tyhle šlěpěje, pane komisaři," pravil pan Rybka rozechvěným hlasem. "Je to pár kroků odtud."

Pan komisař si svítil elektrickou lampičkou. "To byl čahoun, skoro metr osmdesát," mínil, "podle šlápoty a délky kroku. Boty měl slušné, myslím, že ručně šité. Ožralý nebyl a šel dost rázně. Já nevím, co se vám na těch šlěpějích nelíbí." "Tohle," řekl krátce pan Rybka a ukazoval na nedokončený řádek kroků uprostřed ulice. "Aha," děl komisař Bartošek a bez dlouhých okolků zamířil k té poslední šlěpěji, sedl si na bobek a posvítíl si lampičkou.

"To nic není," řekl uspokojeně, "to je docela normální, pevná šlápota. Váha spočívala spíš na patě; kdyby ten člověk udělal další krok nebo skok, přenesla by se váha na špičku nohy, rozumíte? A to by bylo vidět." "To tedy znamená -," ptal se pan Rybka napjatě. "Inu," řekl komisař klidně, "to znamená, že už dál nešel." "A kam se tedy poděl?" vyhrkl Rybka zimničně.

Komisař pokrčil rameny. "To nevím. Máte snad na něho nějaké podezření?" "Jaké podezření?" užasl pan Rybka. "Já bych chtěl jenom vědět, kam se poděl. Podívejte se, tady udělal poslední krok a kam, prokrista, udělal další krok? Vždyť tady není žádná další šlěpěj!" "To vidím," řekl komisař suše. "A co vám je po tom, kam šel? Je to někdo z vašeho domu? Pohřešujete někoho? Tak hergot, co vám na tom záleží, kam se poděl?" "Ale to se přece musí vysvětlit," zabreptal pan Rybka.

"Ĉu vi ne opinias, ke eble li retroiris en la propraj spuroj?" "Sensencaĵo," murmuris la komisaro. "Kiam oni retroiras, oni faras malpli longajn paŝojn kaj iras pli diskrete, por havi pli sekuran ekvilibron; krome oni ne levas la kruojn, do oni devus engravuri per la kalkanoj en la neĝo tutajn sulkojn. En la spurojn estas enpaŝite nur unufoje, sinjoro. Vi vidas ja, kiel akutaj ili estas."

"Do, se li ne revenis," insistis obstine sinjoro Rybka, "kien li perdiĝis?" "Lia afero," murmuris sinjoro komisaro. "Rigardu, se li nenion faris, ni ne rajtas enmiksiĝi en liajn aferojn. Ni devus havi kontraŭ li ian denuncon; poste memkomprene ni entreprenas provizoran enketadon ..." "Sed ĉu oni povas meze de la strato simple malaperi," konsterniĝis sinjoro Rybka. "Vi devas atendi, sinjoro," konsilis al li kviete la ko-misaro. "Se iu malaperis, anoncos tion al ni post kelkaj tagoj lia familio aŭ iu; nu, kaj poste ni serĉos lin. Dum neniu sentas lian foreston, ni povas kun tio nenion fari. Ne eblas."

En sinjoro Rybka komenciĝis leviĝi obskura kolero. "Pardonu," li akre deklaris, "sed mi dirus, ke la polico devus havi ioman intereson pri tio, se trankvila piediranto nenial malaperas meze de la strato!" "Nenio okazis al li," kvietigis lin sinjoro Bartošek. "Ĉi tie ja estas eĉ ne spuro pri lukto - Se iu lin agresus aŭ rabe forkondukus, do devus esti ĉi tie aro da spuroj - Mi bedaŭras, sinjoro, sed mi ne havas kaŭzon interveni." "Sed, sinjoro komisaro," kunfrapis la manojn sinjoro Rybka, "klarigu do almenaŭ al mi. . . Tio ja estas ia mistero. . ."

"Estas," konsentis sinjoro Bartošek enpense. "Eĉ ne imagon vi havas, sinjoro, kiom da misteroj estas en la mondo. Ĉiu domo, ĉiu familio estas mistero. Kiam mi iris ĉi tien mi aŭdis, ke en tiu dometo plorsingultis juna virina voĉo. Sinjoro, misteroj, ili ne estas nia afero. Ni estas salajrataj por ordo. Ĉu vi pensas, ke ni serĉas iun ŝteliston pro scivolo? Sinjoro, ni serĉas lin por lin enkarcerigi. Ordo devas esti." "Do, vidu," ekvortis sinjoro Rybka.

"Nemyslíte, že třeba šel pozpátku ve svých vlastních šlápějích?" "Nesmysl," zabručel komisař. "Když jde člověk pozpátku, dělá kratší kroky a jde víc rozkročmo, aby měl jistější rovnováhu; krom toho nezvedá nohy, takže by musel vrýt patami do sněhu celé rýhy. Do těch stop je šlápnuto jen jednou, pane. Vidíte přece, jak jsou ostré."

"Když teda se nevrátil," naléhal tvrdošijně pan Rybka, "kam se ztratil?" "To je jeho věc," bručel pan komisař. "Koukejte se, když nic neprovedl, tak my nemáme právo se plést do jeho věcí. To bychom museli mít na něho nějaké udání; pak ovšem zavedeme předběžné vyšetřování..." "Ale copak může člověk uprostřed ulice prostě zmizet?" hrozil se pan Rybka. "To musíte počkat, pane," radil mu pokojně komisař. "Zmizel-li někdo, bude nám to za několik dní hlásit jeho rodina nebo kdo; no, a potom budeme po něm pátrat. Dokud ho nikdo nepohřešuje, tak s tím nemáme co dělat. To nejde."

V panu Rybkovi se počal zvedat temný hněv. "Promiňte," prohlásil ostře, "ale já bych řekl, že policie by se měla tak trochu zajímat o to, když klidný chodec z ničeho nic zmizí uprostřed ulice!" "Ono se mu nic nestalo," chlácholil ho pan Bartošek. "Vždyť tu není ani stopy po nějakém zápasu – Kdyby ho někdo přepadl nebo unesl, tak by tady muselo být naděláno šlápot – Mně je líto, pane, ale já tu nemám proč zakročít." "Ale, pane komisaři," spráskl ruce pan Rybka, "tedy mně aspoň vysvětlete... To přece je taková záhada..." "Je," souhlasil pan Bartošek zamyšleně. "Nemáte ponětí, pane, co je na světě záhad. Každý barák, každá rodina je záhada. Když jsem šel sem, tak támhle v tom domku zavzlykal mladý ženský hlas. Pane, záhady, to není naše věc. My jsme placeni za pořádek. Copak si myslíte, že my pátráme po nějakém zloději ze zvědavosti? Pane, my po něm pátráme, abychom ho zavřeli. Pořádek musí být." "Tak vidíte," vyhrkl pan Rybka.

"Kaj tamen vi devas rekoni, ke ne estas en ordo, se iu meze de la strato ... ni supozu, leviĝis vertikale en la aeron, ĉu?" "Tio dependas de la komento," opiniis la komisaro. "Ekzistas polica instrukcio, ke en kazo de fal-danĝero el pli granda alto oni devas esti alligita. Je tio estas unuavice admono kaj poste punpago. Se tiu sinjoro leviĝis nur tiel memvole en la aeron, do tiam devus lin memkomprene, policisto admoni, ke li alkrōu al si savzonon; sed ĉi tie policisto versimile ne estis," li diris ekskuze. "Tiam restus post li plandspuroj. Cetere eble tiu sinjoro foriĝis alimaniere, ĉu?" "Sed kiamaniere?" rapidis diri sinjoro Rybka.

Komisaro Bartošek kapskuis: "Malfacile diri. Eble ia ĉieliro aŭ eskalo de Jakobo," li diris necerte. "Ĉieliro povus esti eble konsiderata kiel forporto, se ĝi okazus perforte; sed mi opinias, ke tio kutime okazas kun konsento de la koncernato. Estas eble, ke tiu homo scias flugi. Ĉu vi ne songis iam, ke vi flugas? Oni nur iom piede forpuŝiĝas, kaj jam oni ŝvebas... Kelkaj flugas kiel balono, sed mi, flugante en songo, devas de temp' al tempo piede repuŝiĝi for de la tero; mi opinias, ke tion kaŭzas la pezaj vestaĵo kaj sabro. Eble tiu homo ekdormis kaj en songo komencis flugi. Sed tio ne estas malpermesita, sinjoro. Kompreneble, sur frekventata strato policisto devus lin admoni. Aŭ atendu; eble ĝi estis levitacio, la spiritistoj kredas je la levitacio; sed ankaŭ spiritismo ne estas malpermesita. Iu sinjoro Baudyš diris al mi, ke li mem vidis, kiel mediumo flugpendis en la aero. Kiu scias, kiom ĝi estas reala."

"Ej, sinjoro," diris sinjoro Rybka riproĉe, "ĉu eble vi kredas tion! Tio ja estus atenco kontraŭ la naturleĝoj -" Sinjoro Bartošek melankolie ŝultrolevis. "Sinjoro, tion mi scias, homoj malobeas ĉiujn eblajn leĝojn kaj ordonojn; se vi estus policisto, vi sciус do pri tio multe pli... La komisaro mangestis. "Tute mi ne mirus, se oni atencus ankaŭ la naturleĝojn. Homoj estas ega friponaro, sinjoro. Nu, bonan nokton; en la piedoj frostas."

"A to prece uznáte, že není v pořádku, aby se někdo prostřed ulice... dejme tomu vznesl kolmo do vzduchu, ne?" "To záleží na výkladu," mínil komisař. "On je policejní předpis, že je-li nebezpečí pádu z větší výše, má být ten člověk přivázán. Na to je v první řadě napomenutí a potom pokuta. Jestli se ten pán vznesl jen tak samovolně do vzduchu, tak by ho ovšem měl strážník napomenout, aby si připnul ochranný pás; ale on tu asi strážník nebyl," řekl omluvně. "To by tu byly po něm šlápoty. Ostatně třeba se ten pán vzdálil jiným způsobem, ne?" "Ale jakým?" děl honem pan Rybka.

Komisař Bartošek potřásl hlavou: "Těžko říci. Třeba nějaké nanebevzetí, nebo Jakubův žebřík," řekl neurčitě. "Nanebevzetí by se snad mohlo považovat za únos, kdyby se stalo násilím; ale já myslím, že se to obyčejně stává se souhlasem dotyčného. Ono je možné, že ten člověk umí létat. Nezdálo se vám někdy, že lítáte? To se člověk jen tak drobet odrazí nohou, a už se vznáší... Někteří letí jako balón, ale já, když ve snu lítám, se musím chvílemi odrážet nohou od země; já si myslím, že to dělají ty těžké šaty a šavle. Třeba ten člověk usnul a ve snu začal létat. Ale to není zakázáno, pane. Ovšem na frekventované ulici by ho musel strážník napomenout. Nebo počkejte, třeba to byla levitace, oni spiritisti věří na levitaci, ale spiritismus taky není zakázán. Mně říkal nějaký pan Baudyš, že to sám viděl, jak médium viselo ve vzduchu. Kdopak ví, co na tom je."

"Ale pane," řekl pan Rybka káravě, "snad tomu nevěříte! To by prece bylo takové porušení přírodních zákonů -" Pan Bartošek pokrčil těžkomyslně rameny. "Pane, to já znám, lidé překračují všechny možné zákony a nařízení; kdybyste byl policajt, tak byste o tom věděl víc..." Komisař mávnul rukou. "Já bych se nedivil, kdyby porušili i přírodní zákony. Lidi jsou velká pakáž, pane. Nu, dobrou noc; ono to zebe."

"Ĉu vi trinkus ĉe mi glason da teo aŭ prunbrandon?" proponis sinjoro Rybka. "Kial ne," murmuris la komisaro melankolie. "Vi scias ja, en la uniformo oni povas iri eĉ ne en gastejon. Tial policistoj tiel malmulte trinkas."

"Mistero," li daŭrigis, sidante en fotelo kaj rigardante enpense, kiel degelas sur la ŝupinto la neĝo. "Naŭdek naŭ homoj irus laŭlonge de la paŝospuroj kaj nenion ili rimarkus. Kaj vi mem ne atentis naŭdek naŭ aferojn, kiuj estas damne misteraj. Ni eĉ ne scietas, kio ĉio ekzistas. Nur kelkaj aferoj ne estas misteraj. Ordo ne estas mistera. La justeco ne estas mistera. Ankaŭ polico ne estas mistera. Sed ĉiu homo iranta surstrate jam estas mistera, ĉar ni ne rajtas je li. Kiam li ion ŝtelas, do li ĉesas esti mistera, ĉar ni lin arestas kaj prete; almenaŭ ni scias, kion li faras, kaj povas lin kiam ajn rigardi tra tia luketo en pordo, ĉu vi scias? Mi petas vin, ĵurnalistoj skribas ekzemple 'Mistera trovo de kadavro!' Kio estas je ia kadavro mistera? Kiam ni ricevas ĝin, ni mezuras ĝin kaj fotografas kaj dissekcas, ni konas ĉiun fadenon, kiun ĝi surhavas, ni scias, kion ĝi laste manĝis, je kio ĝi mortis kaj tiel plu; krome ni scias, ke iu ĝin murdis, versimile pro mono. Ĉio ĉi estas tiel klara kaj komprenebla... Vi povas doni al mi tre malhelan teon, sinjoro.

Ĉiuj krimoj estas klaraj, sinjoro. Je ili almenaŭ vi vidas motivojn kaj ĉion, kio al ili apartenas. Sed mistera estas, kion pensas via kato, pri kio sonĝas via servistino, kaj kial via edzino rigardas tiel enpense el fenestro. Sinjoro, ĉio estas mistera, escepte de punkazoj; ia kriminalaĵo estas precize limigita parto de realo, sektoro, kiun ni prilumis. Sciu, se mi ĉirkaŭrigardus ĉe vi, kelkion mi sciiĝus pri vi; sed mi rigardas mian ŝupinton, ĉar deĵore vi ne rilatas min; nome ni havas je vi neniun denuncon," li aldiris trinketante la varman teon.

"Oni havas ian strangan imagon," li komencis post tempeto, "ke la polico kaj ĉefe la kaŝpolicistoj interesiĝas pri misteroj.

"Nevypil byste tadyhle u mne sklenici čaje... nebo slivovice?" navrhl pan Rybka. "Proč ne," bručel komisař melancholicky. "To víte, v téhle uniformě nemůže člověk ani do hospody. Proto policajti tak málo pijí."

"Záhada," pokračoval sedě v lenošce a dívaje se zamyšleně, jak mu taje na špičce boty sníh. "Devětadevadesát lidí by šlo podle těch šlépějí a ničeho by si nevšimli. A vy sám si nevšimnete devětadevadesáti věcí, které jsou zatraceně záhadné. My víme starou belu, co všechno je. Jenom některé věci nejsou záhadné. Pořádek není záhadný. Spravedlnost není záhadná. Policie taky není záhadná. Ale každý člověk, který jde po ulici, už je záhadný, protože na něho nemůžeme, pane. Jakmile něco ukradne, tak přestane být záhadný, protože ho zavřeme, a je to; aspoň víme, co dělá, a můžeme se na něho kdykoliv podívat takovým okýnkem ve dveřích, víte? Prosim vás, tihle novináři třeba píší 'Záhadný nález mrtvoly!' Co je na takové mrtvole záhadného? Když ji dostaneme my, tak ji změříme a ofotografujeme a rozřežeme; my známe každou niť, co na ní je, víme, co posledně jedla, nač zemřela a kdesi cosi; mimoto víme, že ji někdo zabil nejspíš pro peníze. To je všechno tak jasné a vyložené... Můžete mně dát hodně tmavý čaj, pane.

Všechny zločiny jsou jasné, pane; na nich aspoň vidíte pohnutky a všechno, co k tomu patří. Ale záhadné je, co si myslí vaše kočka, o čem se zdá vaší služce a proč se vaše žena dívá tak zamyšleně z okna. Pane, všechno je záhadné krom trestních případů; takový kriminální případ, to je přesně určený kousek skutečnosti, takový výsek, na který jsme si posvítili. Koukněte se, kdybych se tady rozhlíd, tak bych o vás ledacos poznal; ale já se dívám na špičku své boty, protože mně po vás úředně nic není; my totiž na vás nemáme žádné udání," dodával srkaje horký čaj.

"To je taková divná představa," začal zase po chvíli, "že policie a hlavně tihle tajní se zajímají o záhady.

Ni tudas je viaj misteroj; nin interesas deliktoj. Sinjoro, nin ne interesas krimo, ĉar ĝi estas mistera, sed ĉar ĝi estas malpermesita. Ni ne persekutas iun kanajlon pro intelekta intereso; ni persekutas lin por lin aresti en nomo de la leĝo. Sciu, stratpurigistoj ne kuras kun balailo tra la stratoj, por legi spurojn en polvo, sed por balai kaj forigi ĉiun malpuraĵon, kiun la vivo tie faras. La ordo estas eĉ ne iomete mistera. Fari ordon estas terura laboro, sinjoro; kaj kiu volas fari ordon, devas enŝovi la fingrojn en ĉiun malpuraĵon.

Mi petas vin, iu devas tion fari," li diris melankolie, "same kiel iu devas buĉi bovidon. Sed buĉi bovidojn pro scivolo estas brutaleco; tion oni devas fari metie. Se oni havas devon ion fari, almenaŭ oni scias, ke oni rajtas tion fari. Sciu, la justeco devas esti nedubebla, kiel multipliko. Mi ne scias, ĉu vi povus pruvi, ke ĉiu ŝtelo estas malbona; sed mi pruvos al vi, ke ĉiu ŝtelo estas malpermesita, ĉar ĉiukaze mi vin arestos. Se vi estus dissemanta perlojn surstrate, do policisto vin admonos pro malpurigado de stratoj. Sed se vi komencus fari miraklojn, do ni ne povas malhelpi vin en tio, eventuale ni povus trakti tion kiel publikan skandalon aŭ ne permesitan homtumulton. Devas enesti ia malkonvenaĵo, por ke ni enmiksiĝu."

"Sed sinjoro," oponis sinjoro Rybka, maltrankvile sidante, "ĉu tio ĉi ne sufiĉas al vi? Ĉi tie temas pri ... pri ia stranga afero... pri io tiel mistera... kaj vi..." Sinjoro Bartošek ŝultrolevis. "Kaj mi lasas tion drivi. Sinjoro, se vi deziras, mi igos la plandspuron forigi, por ke ĝi ne ĝenu vian dormon. Pli multe mi ne povas fari. Ĉu vi aŭdas ion? Iajn paŝojn? Jen preteriras nia patrolo; do estas jam la dua kaj sep minutoj. Bonan nokton, sinjoro."

Sinjoro Rybka akompanis la komisaron al la pordeto; meze de la strato ankoraŭ estis la nefinita kaj nekomprenebla vico da paŝoj. Sur la alia trotuaro proksimiĝis policisto. "Mimra," vokis la komisaro, "ĉu vi havas ion novan?" Policisto Mimra salutis. "Preskaŭ nenion, sinjoro komisaro," li raportis.

My se vám vykašleme na záhady; nás zajímají nepatřičnosti. Pane, nás nezajímá zločin, protože je záhadný, ale protože je zakázaný. My nehoníme nějakého toho lumpa z intelektuálního zájmu; my ho honíme, abychom ho zatkli ve jménu zákona. Poslouchejte, metaři neběhají s koštětem po ulici, aby četli v prachu lidské stopy, ale aby smetli a uklidili to všechno svinstvo, co tam život nadělá. Pořádek není ani drobet záhadný. Dělat pořádek je svinská práce, pane; a kdo chce dělat čistotu, musí strkat prsty do každého neřádu.

Prosím vás, někdo to musí dělat," řekl melancholicky, "jako někdo musí zabíjet telata. Ale zabíjet telata ze zvědavosti, to je surovost; to se má dělat ze řemesla. Když má člověk povinnost něco dělat, tak aspoň ví, že má právo to dělat. Koukněte se, spravedlnost musí být nepochybná jako násobilka. Já nevím, mohl-li byste dokázat, že každá krádež je špatná; ale já vám dokážu, že každá krádež je zakázaná, protože vás v každém případě seberu. Kdybyste rozséval na ulici perly, tak vás strážník napomene pro znečišťování ulic. Ale kdybyste začal dělat zázraky, tak vám v tom nemůžeme bránit, ledaže bychom tomu řekli veřejné pohoršení nebo nedovolený shluk lidí. Musí to být nějaká nepřístojnost, abychom se do toho vložili."

"Ale pane," namítal pan Rybka vrtě sebou nespokojeně, "copak vám tohle stačí? Tady jde o... takovou divnou věc... o něco tak záhadného... a vy..." Pan Bartošek pokrčil rameny. "A já to nechávám plavat. Pane, chcete-li, já nechám tu šlápěj odklidit, aby nerušila váš noční klid. Víc nemohu dělat. Neslyšíte nic? Žádné kroky? To jde naše patrola; tak to už jsou dvě hodiny a sedm minut. Dobrou noc, pane."

Pan Rybka doprovázel komisaře z vrátek; prostřed ulice byl ještě ten nedokončený a nepochopitelný řádek kroků. Po druhém chodníku se blížil strážník. "Mimro," zavolal komisař, "máte něco nového?" Strážník Mimra zsalutoval. "Celkem nic, pane komisaři," hlásil.

"Tie antaŭ la numero dek sep miaŭis ekstere kato; mi sonorigis do je ili, por ke ili enlasu ĝin hejmen. Ĉe numero naŭ ne estis fermita pordeto. Ĉe la stratangulo oni disfosis straton kaj ne metis tien ruĝan lanternon, kaj ĉe spicisto Maršik malfirmiĝis afiŝtabulo; morgaŭ oni devos tion depreni, por ke ĝi ne falu sur ies kapon." "Ĉu ĉio?" "Jen ĉio," opiniis policisto Mimra. "Matene oni devos ŝuti sablon sur trotuarojn, por ke neniuj rompu sian kruron; oni devos ĉie sonorigi je la sesa --" "Do bone," diris komisaro Bartošek. "Bonan nokton!"

Sinjoro Rybka ankoraŭ foje rerigardis la plandspurojn, kondukantajn al nekonata loko. Sed tie, kie estis la lasta plandspuro, nun estis du solidaj spuroj post deĵorbotoj de policisto Mimra; kaj de tie daŭrigis plu la larĝaj plandspuroj en regula kaj klarvidebla vico. "Dank' al Dio," respiris sinjoro Rybka kaj iris dormi.

"Tamhle v čísle sedmnáct mňoukala venku kočka; tak jsem na ně zazvonil, aby ji pustili domů. V čísle devět neměli zavřená vrátka. Na rohu rozkopali ulici a nedali tam červenou lucernu, a u hokynáře Maršika se na jedné straně uvolnila vývěsní tabule; budou to muset ráno sundat, aby to někomu nespadlo na hlavu." "To je všechno?" "To je všechno," mínil strážník Mimra. "Ráno se budou muset sypat chodníky, aby si někdo nezlomil nohu; mělo by se v šest hodin všude zazvonit --" "Tak je dobře," řekl komisař Bartošek. "Dobrou noc!"

Pan Rybka se ještě jednou ohlédl po těch šlépějích, jež vedly do neznáma. Ale tam, kde byla poslední šlépěj, byly teď dva důkladné otisky služebních bot strážníka Mimry; a odtud pokračovaly ty široké šlápoty pravidelnou a jasnou řádkou dál. "Zaplaťpánbůh," oddychl si pan Rybka a šel spát.